HUNGARA FERVOJISTA MONDO

Esperanto, Internacia lingvo

Vidaĵoj el la tramo nro 2 en Budapeŝto

4
---------- 63-a jarkolekto
2019

HUNGARA FERVOJISTA MONDO
Revuo de la Fervojista Esperanto-Movado en Hungario
Fondita de D-ro István Bácskai en la jaro 1957.
.....
Respondeca redaktoro:
István Gulyás
Eldonas:
Hungara Fervojista Esperanto-Asocio
Hungara Sekcio
de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio
Poŝta adreso: HU-1155 Budapest
Rákos út 98. I/9.
Aperas kvaronjare
Abonprezo: al hungara adreso: HUF 2000
al eksterlanda adreso: EUR 12
*
MAGYAR VASUTAS VILÁG
A magyar eszperantista vasutasok központi lapja
Felelős szerkesztő: Gulyás István
Kiadásért felelős
A Magyar Vasutas Eszperantó Egyesület
„Szkenguru" Nyomda Budapest
Felelős vezető: Balla László
.....
ISSN 0230-323x
.....

ENHAVTABELO:

62. I. Gulyás: Internacia aktiveco

63. J. Horváth: 49-a Landa Amika Renkontiĝo

65. I. Gulyás: Tramtrafiko en Budapeŝto

67. L. Gabalda: BET-55 en Litovio

69. L. Gabalda: 104-a **U**niversala Kongreso

71. L. Gabalda: 92-a SAT-Kongreso

73. J. Halász: Elektrizado de fervoja linietapo

76. M. Pintér: Postkongreso en Maroko

63-a jaro N-ro 4, OKTOBRO - DECEMBRO

INTERNACIA AKTIVECO

Mi legas la Gazetarajn Komunikojn de UEA, kaj mi kun ĝojo spertas la internacian aktivecon de la esperantistoj. UEA partoprenas en multaj movadoj, kiujn la Unuiĝintaj Nacioj (UN), Unesko kaj aliaj internaciaj organizaĵoj anoncas. Jam de pli ol 60 jaroj UEA kultivas kunlaborajn rilatojn kun pluraj branĉoj de UN. En Novjorko (ĉefprotektanto: Humphrey Tonkin el Usono) temas pri la Departamento pri „Publika Informado" kaj la „Ekonomia kaj Socia Konsilio"; en Parizo (ĉefprotektanto: Renée Triolle el Francio) pri la „Organizo de UN pri Edukado, Scienco kaj Kulturo"; en Ĝenevo (ĉefprotektanto: Stefano Keller el Hungario) kaj en Vieno (ĉefprotektanto: Hans-Michael Maitzen el Aŭstrio) pri diversaj organoj de UN rilate al „Paco, Homaj Rajtoj kaj Indiĝenaj Popoloj". En la lastaj jaroj tiuj internaciaj aktivecoj fortiĝis kaj pliboniĝis. Ekzemple ekde marto 2018 UEA troviĝas en la estraro de la Konferenco de Negistaraj Organizoj en Konsultaj Rilatoj kun UN; TEJO kun UEA kunlaboras en la estraro de la Internacia Kunordiga Renkontiĝo de Junularaj Organizoj; la Internacia Virina Tago la 8-an de marto, la Internacia Tago de Familioj la 15-an de majo, la Internacia Tago de la Indiĝenaj Popoloj de la Mondo la 9-an de aŭgusto, ktp ĉiuj rolas en la programoj de la esperantistoj. La plej lasta anonco de la Ĝenerala Asembleo de UN estis la „Internacia Tago de Paco", kiu okazis la 21-an de septembro. UN akceptis 17 celojn por daŭripova evoluigo jam en 2015, inter ili la „Klimatan Agadon por Paco", kiu estas la temo de la ĉi-jara Internacia Tago de Paco. La Esperanto-movado per sia tutmonda reto de komunikado povas ludi signifan rolon en la pozitiva agado por paco kaj klimato. En la numero 1/2019 HFM mi jam detale skribis pri la diversaj „Internaciaj Tagoj" kun titolo „Gravaj Tagoj". Mi kun ĝojo taksas, ke la malnova estraro de UEA, kaj ankaŭ la nova sentis kaj kontinue sentas la gravecon de la internacia agado kaj la ĉeeston en la internaciaj organizaĵoj.

István Gulyás

49-a Landa Amika Fervojista Renkontiĝo

(De reloj sur akvon)

La ĉi-jara, jam la 49-a Renkontiĝo de la hungaraj fervojistaj esperantistoj okazis en la akvoriĉa somerumejo Tiszafüred, “ĉefurbo de la Lago Tibisko (Tisza)”, kies naskito la agema kaj kapable organiza Julianna Vas-Szegedi aranĝis nun nian rendevuon inter la 28-a kaj 30-a de junio.

Pepita Junulara Hotelo

La plejparto de la partoprenantoj startis el la stacio Budapest-Keleti, sed malfaciligis la vojaĝon, ĉar inter la stacio Keleti kaj Hatvan okazis fervoja renovigo, kaj oni devis vojaĝi sur tiu etapo per aŭtobuso. Tamen la aŭtobus-trafiko, la kunligoj kaj la vagonŝanĝoj okazis enorde kaj precize, pro tio la trajnoj alvenis al Tiszafüred akurate.

Pro la aĝo de la partoprenantoj kaj la tiaokaze kutima varmego estis grava vidpunkto por ni, ke la okazejo estis ne malproksime de la stacidomo kaj la aŭtobusa stacio. En la transporto de la vojaĝantoj multe helpis Julianna kaj ŝia amikino per siaj aŭtoj.

La trideksep partoprenantoj havis tranoktejon en urbocentra pensiono „Pepita Junulara Hotelo”, kiu preskaŭ tuta estis je nia dispono. Plia neignorebla avantaĝo estis, ke la trifojaj manĝoj estis servataj en la eleganta restoracio de la sama pensiono. La ĉambroj estis puraj kaj komfortaj, kvankam la televidiloj ne estis revivigeblaj pro la koditaj kanaloj kaj ankaŭ la libera vifio ne funkciis malgraŭ la promeso en la program-antaŭvido.

Antaŭ la enirejo de la fortikaĵo Eger

La unua posttagmezo, vendrede, estis libera por promenado kaj amuziĝo en la urbo. Feliĉe, la distancoj tie ne estis grandaj, kaj ni povis post iom da piedirado rigardi la vidindaĵojn de la urbo, la kalvinanan preĝejon kun sia impona, sesetaĝa turo kaj fenestroj el la jaro 1230, la klasikisman katolikan preĝejon, la urbodomon, la sinagogon, en kiu nun funkcias magazeno. Kaj kiuj preferis baniĝon, tiuj vizitis dum la sama posttagmezo la termoakvan banejon de la urbo.

Por la vesperoj estis antaŭviditaj filmoprezentadoj de Győző Gaál pri la svisa urbo Laŭzano kaj la vivo de la tieaj esperantistoj kaj vojaĝo tra Sicilio. Bedaŭrinde pro la diablo de la tekniko ni devis malhavi ĉi tiun plezuron.

La dua tago, sabato, estis dediĉita por ekskurso al urbo Eger. Ni veturis malfervojiste, tamen en klimatizita aŭtobuso, kio estis vere refreŝigo dum tiu varmega tago. Dank’ al Dio la buso veturigis nin laŭeble plej proksime al la ĉefa celo, la fortikaĵo, kie epokfidele vestita kaj armita “oficiro” rakontis al ni en la Halo de Herooj pri la vivo de la fortikaĵo en la

XVI-a jarcento kaj pri la sieĝo de la turkoj. Ni povis konatiĝi kun la ĉiutagoj kaj neĉiutagoj de la limfortikaĵaj soldatoj kaj viziti la diversajn eksponejojn, konstruaĵojn de la fortikaĵa komplekso, ĝui la panoramon de la urbo de sur la kavaliero, do altaĵo por kanonoj. Du epokfidele vestitaj “soldatoj” prezentis al ni la ŝargadon de kaj knalegantan pafon el vera muskedo. Ni malsupreniris en la kazematojn, rigardis la vaksomuzeon kun la herooj de la sieĝo de 1552 kaj el la romano de Gárdonyi “Steloj de Eger”.
El la fortikaĵo ni laŭiris piede la vidindaĵojn de la urbo, pri kiuj detale eĉ esperantlingve parolis Győző Gaál. Ni rigardis la pompan barokan konstruaĵon de la iama prefektuja rezidejo kaj prizono kun la ferartaĵoj de Henrik Fazola el riĉe forĝitaj ornamaĵoj, la kanonikan domvicon, la universitaton Esterházy, la bazilikon kaj la promenostraton Széchenyi de la urbo. Post abunda, kvankam longe atendata tagmanĝo en la urbocentro ni iris al la renovigita kaj plibeligita ĉefplaco Dobó, kie estis eksponitaj mirindaj naturfotoj, kaj ni havis la feliĉon aŭskulti okazan ciganbandon ludi aŭtentan ciganan muzikon, viziti la barokan preĝejon de la minoraj fratoj, plezuriĝi pri la novstila fontano. Poste ni laŭiris la Esperanto-promenejon.

Julianna Vas-Szegedi kaj la boatanoj

Posttagmeze nia buso veturigis nin en la Valon de Belulino, fama loko de vinberkeloj kaj gastamaj restoracioj. En du keloj ni havis okazon gustumi la karakterizajn vinojn de la regiono, ekzemple Knabineto de Eger, Taŭro de Eger, moskatelo, Merlo, Medina kaj ties "geedzigaĵon".

Ankaŭ la tria tago dimanĉa ne restis sen amuzoj. La fervojistoj forlasis siajn relojn kaj sidiĝis en du boatojn, por malkovri la naturbelaĵojn de la Lago Tibisko, morta branĉo de Tibisko, eĉ ni povis elnavigi ankaŭ sur la vivan riveron Tibisko ĝis la fervoja ponto. Ni preterpasis mirindajn akvajn vegetaĵojn (ekzemple blankajn nimfeojn, trapojn, el kies fruktoj oni faras ĉokoladon) kaj birdojn (noktardeojn, filikojn, ardeojn, sovaĝanasojn), vidis la postsignojn de la laboro de kastoroj. La boatestroj estis spertaj konantoj de tiu akva mondo kaj ne malŝparis transdoni siajn informojn al ni. Fine de la ekskurso ni estis regalitaj per freŝaj sandviĉoj.

Dum la interparoloj ni havis okazon diskuti la okazejon de la sekva renkontiĝo (ĉu en Szolnok aŭ duloke: en Szolnok kaj Kecskemét), kaj havis la promeson de Julianna, ankaŭ estonte volonte disponiĝi por organizado de sekvaj renkontiĝoj. Ni parolis pri la stato de la fervojista kaj ĝenerale Esperanta movado, kaj konstatis, ke la tradiciaj formoj de la movado retrocedas al la teknike novaj ebloj de Interreto, kie la sekva generacio vivas viglan, pli liberan vivon kun novaj ebloj kaj formoj de kontaktiĝoj.

Se resumi, ni povas diri, ke la programoj estis distraj, multfacetaj, la tradiciaj elementoj de tiaj renkontiĝoj miksiĝis kun novaj elementoj. La organizado estis fleksebla, adaptiĝema al la neantaŭvideblaj obstakloj kaj novaj ebloj, nepre meritanta nian laŭdon kaj dankon al Julianna Vas-Szegedi.

József Horváth

TRAMTRAFIKO EN BUDAPEŜTO

En la longa historio de Budapeŝto estis la plej grava evoluado, kiam la 1-an de januaro 1873 Pest, Buda kaj Óbuda unuiĝis en la nomo „Budapest”. En la seninterrompe evoluita ĉefurbo oni devis evoluigi precipe la amastrafikon. Pli frue nur kalesoj kaj ĉevalrajdoj certigis la trafikajn eblecojn. Eĉ en la jaro 1866 – en la mondo sesaj – startis la unua ĉevaltramo inter la placo Kálvin kaj la urboparto Újpest. En la komenco de la jaroj 1880 jam en 15 rilatoj trafikis ĉevaltramoj kaj omnibusoj. Tamen tiuj trafikeblecoj ne kontentigis la trafikajn dezirojn en la rapide evoluanta ĉefurbo.

La unua tramo antaŭ la Okcidenta Stacidomo en 1887

En Germanio la unuan publiktrafikan tramon oni transdonis al la vojaĝantoj apud Berlino en la urboparto Gross-Lichterfelde en la 16-an de majo 1881. Per tio kuraĝiĝis en Hungario la Komerca kaj Trafika Ministerio, kaj ĝi eldonis permesilon en la 1-an de oktobro 1887 por estigi unu kilometran provlinion inter la Okcidenta Stacidomo kaj la strato Király. Tamen la kompetenta magistrato ne permesis konstrui superteran trakcikurentan lineon, pro tio la firmao Siemens prilaboris malsupran elektran kablan sistemon. En tiu kadro de la provlinio oni konstruis antaŭ la Okcidenta Stacidomo provizoran tramhalon. Post du monatoj – la 28-an de novembro – jam ekiris la unua tramo sur ĉi tiu linio. Tie trafikis du motorvagonoj kaj unu postvagono sur ĉi tiu 1000 mm-a ŝpura linio. La plej granda rapido estis permesita 10 km/h. Estis interese, ke la straton Andrássy oni permesis krucigi nur per 5 km/h rapido, kaj la observadon de tiu rapido senĉese kontrolis rajdpolicisto.

En 1888 estis fondita la kompanio Budapeŝta Urba Fervojo (BVV), kiu jam en 1889 ekfunkciigis la unuan normal-ŝpuran urban fervojlinion en Budapeŝto inter la placo Egyetem kaj la Publika Tombejo. La tramojn produktis la firmao Siemens, kiuj vekis sensaciojn, kaj la tramoj ekiris al mondkonkeranta vojo. Ankaŭ en Budapeŝto eksterordinare daŭrigis la evoluo de la tramtrafiko per estigo de novaj tramlinioj, per aĉeto de novaj kaj pli modernaj tramoj, per establo de bontenadaj bazoj kaj tramtrafikregejoj, per vagonriparejoj kaj per konstruo de tramhaloj. La unua mondmilito malrapidigis la evoluadon de la tramtrafiko, sed post la milito oni enkondukis la unuecajn tarifojn kaj la efikan trafikpolitikan imagon. Oni establis la kompanion „Budapest Székesfővárosi Közlekedési Rt” (BSZKRT), kiu ekprosperigis la tramtrafikon en Budapeŝto. La dua mondmilito okazigis grandegajn damaĝojn en la veturilaro, fervojreto kaj en la priservantaj establejoj. Pereis la 84%-oj de la katenario. Oni devis tute reorganizi la tutan tramtrafikon en Budapeŝto, ĉefe estis bezonata aĉeti novajn tramojn kaj evoluigi la fervojreton. En la 1956-a revolucio denove grave suferis la tramtrafiko, ja difektiĝis

La tipo Combino sur la placo "Szél Kálmán"

109 tramoj, dutrionoj da katenario, grandaj partoj de la fervojreto, eĉ la priservantaj establaĵoj. La rekonstruo de la tramtrafikiloj, la organizado de la tramtrafiko rapide efektiviĝis, kaj la evoluigo estis kontinua kaj senĉesa.
En la jaro 1968 establiĝis la kompanio Budapeŝta Trafika Entrepreno (BKV), per kio naskiĝis nova integra trafika organizo. Nuntempe la longeco de la fervojreto estas 149 km-j, la nombroj de la haltejo estas 344, la nombroj de la tramoj estas 587, kaj la ŝpuro de la fervojretoj estas 1435 mm-j. La ĉiutaga nombro de la vojaĝantoj estas 1,2 milionoj. La plej frekventataj tramvojoj estas la numeroj 4-a, 6-a kaj la 1-a. La plej moderna tramo estas la tipo Combino. Post la jarmilŝanĝo komenciĝis la evoluigo de kvar tramringoj. Ĝis 2015 rekonstruiĝis la Malgranda kaj Granda Bulvardaj tramlinioj, la linioj de la Bulvardo Hungária, kaj la t.n. ekstera tramringo inter la distriktoj Zugló kaj Ferencváros. En 2011 reekfunkciis la noktaj veturlinioj sur kelkaj linioj.

La monto Gellért kun la tramo numero 2

En 1949 komenciĝis estigi la trolebusaj retoj, pro tio multaj tramretoj ĉesis. Samtempe oni ŝanĝis la tramnumerojn, kaj la tramoj ricevis la numerojn ekde 1 ĝis 69, kaj la trolebusoj ricevis la numerojn ekde 70 kaj supren. La trolebusoj transportis 250 mil vojaĝantojn po tage. Ne nur malpliiĝis la longeco de la tramretoj en Budapeŝto, ĉar multajn retojn oni plilongigis ĉefe en la eksteraj partoj de la budapeŝtaj distriktoj, eĉ ankaŭ en la interna ĉefurbo. Multaj helpis la nivelon de la trafiko en Budapeŝto la konstruo de la Metroo, el kio jam funkcias kvar metrolinioj, en ĝi la t.n. Milenia Subtera Fervojo. Tiun fervojon oni nomas numero 1-a metrolinio, sed tiu fervojo konstruiĝis rekte sub la strato, kaj ĝiaj parametroj (mallongaj interstaciaj distancoj, energiaprovizado, longeco de la stacioj ktp) prefere estas karakterizaj al la tramlinioj. La metroo po tage kunportas pli ol unu milionojn da pasaĝeroj.(Pri la Budapeŝta Metroo mi skribos en la sekva numero de HFM).
Estas interesa, ke la danubbordan nro 2-an tramon oni enmetis inter la 10 plej belajn tramvojojn. La „National Geographic" pretigis liston en la libro de „Por vivaj vojaĝadoj" pri tiuj 10 tramlinioj. Inter tiuj la nro 2-an linion la libro mencias en la sepan lokon. Sur tiu tramo la vojaĝantoj povas admiri proksime de la Parlamentejo, la Danubkorson, la hotelvicon apud la Danubo, la mirindan panoramon de la urboparto Buda, la Fiŝkaptistan Bastionon, la preĝejon Matiaso, la fortikaĵon Buda, la monto Gellért, kelkajn danubajn pontojn k.a. Tiu tramo estas la plej populara inter la turistoj.
Mi rimarkas, ke en Hungario ankoraŭ en tri urboj troveblas kaj funkcias tramtrafiko. Tiuj estas Debrecen, Miskolc kaj Szeged. En la 1960-aj jaroj ankoraŭ en urbo Pécs kaj Szombathely ekzistis tramtrafiko, sed tion jam oni ĉesigis.

Mi povas konstati, ke la tramtrafiko en Budapeŝto post longaj kaj malfacilaj tempoj konstante evoluas, kaj bone servas kaj certigas la trafikajn dezirojn kaj bezonaĵojn de la loĝantaro kaj turistoj.

István Gulyás

BET-55 en Litovio - Panevėžys
6.7. - 14.7. 2019

Baltiaj Esperanto-Tagoj bonvenigis nin per pluv-sun-venta vetero. Ili estas internaciaj aranĝoj kun altnivelaj programeroj kun simila enhavo kiel la Universalaj Kongresoj. BET-oj okazadas laŭvice en Estonio-Latvio-Litovio. Ĉiutage aperis riĉe ilustrita kvarpaĝa kuriero ABELO, redaktita de Stano Marček. Per ĝi ni estis informitaj pri diversaj okazaĵoj, aperis listo de novaj aliĝintoj, taga programo kaj manĝmenuo. Li ankaŭ kompilis belan BET-libron kun multaj utilaj sciigoj kaj raportoj de ĉiuj jam okazintaj BET-aranĝoj en Litovio.
Aliĝis 425 esperantistoj el 37 landoj. Tamen kelkaj ne povis alveni pro diversaj kialoj. Laŭ la nombro de partoprenantoj la ĉi-jara BET estas la plej impona lastatempe. La 6-an de julio Litovio festas Nacian Tagon. Estas kutimo kanti la himnon (nacian Glorkanton) je la 9-a horo vespere ie ajn en la mondo, kie troviĝas litovoj. Do, same okazis dum la BET-55 post la vespera koncerto de Natalia Bertse.

Inaŭguro de BET

La solena inaŭguro okazis la dimanĉan posttagmezon en la kultura centro de Panevėžys kun la ĉeesto de la urbestro s-ro Rytis Račkauskas. La prezidanto de la litova Esperanto-Asocio Povilas Jegorovas bonvenigis ĉiujn partoprenantojn bondezirante sukceson al la evento. Biruta Rozenfelde estis iniciatinto de BET-oj antaŭ sesdek jaroj. Post la prezentado de diversaj salutvortoj, artaj folkloraj grupoj de la urbo prezentis belegan spektaklon de kantoj kaj dancoj. Poste okazis por ĉiuj riĉa urbestra akcepto.
La programo de BET-55 estis varia kaj riĉega. Ne eblas mencii ĉiujn programerojn, ĉar unu paĝo ne sufiĉus. Okazis sinsekvo da prelegoj de Somera Universitato, de SUS-36 (Sanmarineca Universitata Sesio) de AIS (Akademio Internacia de la Sciencoj) pri kiu eblis aĉeti IKU-libron. Interesaj estis ankaŭ aliaj prelegserioj pri diversaj temoj.

La partoprenantoj povis ekkoni la historion de la litova lingvo kaj ĝian kulturon fare de Aloyzas Gudavičius. Pri spacteleskopoj informis Amri Wandel, pri religio kaj sociologio de Esperanto Walter Żelazny. En prelegserio de Gábor Márkus “Ĉu Esperanto plibonigis/plibonigas la mondon?” ni provis trovi la respondon. Prelegserio de Orlando Raola temis pri “Media kemio”, medioprotektado en la hidrosfero, terkrusto, biosfero. La prelegciklon pri “Lingvo kaj kulturo” prezentis Ilona Koutny.
Pri la azia movado informis Lee Jungkee, pri historia E-movado en Ĉinio kaj instruado en ĉinaj universitatoj kaj lernejoj kaj pri la situacio de medio kaj energio en Ĉinio donis informojn Gong Xiaofeng (Arko). Amuze kaj serioze pri diversaj karakteroj de Esperanto parolis Aleksandr Melnikov. Baŭhaŭsan artan stilon prezentis Peter Kühnel. Pri “Zamenhofaj objektoj” parolis Robert Kamiński. Li ankaŭ iniciatis kaj instalis interesan ekspozicion de Zeoj. La mondon de fabeloj kaj diversaj herooj prezentis Anna Stri-

ganova. Pri la eldonejo Impeto, pri la Reta Revuo de Esperanto, pri modernaj sociaj retoj kaj Esperanto parolis Dima Ŝevĉenko. “Ĉu muziko povas kuraci?” kaj kiamaniere tio okazas klarigis Pavla Dvořáková. Pri “Plastaĵoj en la diversaj akvosferoj” informis Manfred Westermayer. Pri gravitaj ondoj parolis Alfred Heiligenbrunner. Intelektajn ludojn prezentis Tatjana Auderskaja. Kanadanoj varbis por venontjara UK en Montreal. Ĉeestantoj spektis la filmon "Litvo - Patrujo mia" de Roman Dobrzyński. Okazis kunveno de ĵurnalistoj kaj aŭtoraj horoj kun Mikaelo Bronŝtejn kaj Tatjana Auderskaja. Estis lanĉita nova eldono de “Baza literatura Krestomatio”. Riĉa estis la libroservo, okazis interesaj kvizoj, por Di-kredantoj okazis Meso. Admirinda estis la ekspozicio de pupoj de Anna Striganova. Kortuŝan prezentadon montris sepjaraĝaj infanoj de la urba infanĝardeno “Puriena” laŭ la slovena popola fabelo “Paŝtisteto”.
La diversnivelajn Esperanto-kursojn gvidis la jenaj instruistoj: Stano Marĉek el Slovakio, Nina Petuchovska el Pollando, Abdurachman Junusov el Dagestano, Anne Joussions kaj Françoise Noireau el Francio, Svetlana Smetanina el Rusio, Mikaelo Lineckij el Ukrainio.

Gábor Márkus prelegas en la kadro de BET

La oferto de la esperantista arta programo estis varia kaj tre riĉa. Okazis ĉiutagaj posttagmezaj kaj vesperaj koncertoj. Kun granda sukceso kaj aplaŭdo koncertis por ni la konata litova familia grupo “Sepa kaj Asorti”, Kaŝi el Germanio, Amira Chun el Koreio, Jogaile Ĉojute el Litovio, Mikaelo Bronŝtejn el Rusio akompanata de Sergej Straŝnenko (La Terura) ankaŭ el Rusio, Zuzana Kornicka el Pollando. Violonis Françoise Noireau el Francio. Belsonis ankaŭ kantoj el Ukrainio.

Dum la adiaŭa vespero prezentiĝis niaj talentuloj. Ni ĝuis Esperanto-kantojn el Ukrainio, Svislando, Ĉeĥio, Rusio, Pollando, korean dancon, poemon de knabino Daŝa el Rusio. Ventro-dancadon prezentis litova junulino. Mikaelo Lineckij reĝisoris la programon kaj prezentis la artistojn.

Neforgesebla estis la tuttaga ekskurso al la urbeto *Birzai*, kie ni en kastela muzeo gustumis bieron, ekkonis ĝian fabrikadon kaj ĝuis muzikan prezenton. Poste ni daŭrigis la busvojaĝon al regiona parko, kie eblis supreniri rigardejon en formo de ŝipo kaj fine en urbeto ni *Pakruojis* ni bonguste tagmanĝis kaj promenis en bienpalaca ĝardeno admirante belegajn florkomponaĵojn. La duontaga ekskurso gvidis nin al bieno de aromaj plantoj, kie ni mem pretigis infuzaĵon el ili kaj gustumis lokan mielon kun fromaĝo.

Solena fermo okazis la 13-an de julio. Estis prezentita statistiko pri BET-55, disdonitaj atestiloj al sukcesintaj ekzamenitoj, rozoj al ĉiuj LKK-anoj kaj helpintoj.

Koran dankon al litovaj esperantistoj, kiuj multe laboris por sukcesigo de BET-55 kaj al multaj eksterlandaj gastoj, kiuj kontribuis al la aranĝo per diversaj eroj.

Liba Gabalda

La 104-a UNIVERSALA-KONGRESO
20.7. - 27.7. 2019

Movada foiro dum la 104 UK en Lahtio

Ĝi okazis en Finnlando en Lahtio, ne tro granda urbo, ĉirkaŭata de bela naturo, kiu famas pri vintraj sportoj. Ne pretervideblaj estas la tri skisaltejoj apud la sport-halo *ISKU AREENA*, kie la teamo *Pelicans* (Pelikanoj) trejnas sin kaj ludas glacihokeon. Tie okazis ankaŭ la ĉi-jara 104-a Esperanto-Kongreso. Verdire elekto de sporta stadiono por la UK ne konvenas. Salonoj (aŭ pli bone kameroj) estas tre malgrandaj, pluraj ŝtuparoj sen lifto kaj altaj ŝtupoj en la stadiono ne estas adekvataj por pli aĝaj personoj, kiuj tamen en la UK-oj estas plimulto. Bonŝance ne okazis akcidentoj. Avantaĝo estis, ke ni bone vidis la podianojn kaj ni povis enrigardi malantaŭ la kulisoj de la sportejo. Konvena salono estis en apuda lernejo *Salpus*, kie troviĝis ankaŭ la dua manĝejo. La manĝoj estis bongustaj.

Finnlando estas lando de "Mil kaj unu lagoj…, betuloj…, saŭnoj…". En vastaj arbaroj promenas boacoj kaj abundas fungoj; en lagoj naĝas fiŝoj.
Al la kongreso aliĝis 917 geesperantistoj el 57 landoj. La programo, kiel kutime estis ampleksa kaj varia. Krom kutimaj kongres-programeroj (Movada foiro, Kleriga lundo, Tago de lernado, E-kursoj, KER ekzamenoj, IKU-AIS sesioj, Belartaj konkursoj, Urba akcepto, Esperantologia konferenco, Aŭkcio ktp.) la ĉeestantoj povis akiri praktikojn en aikido, eŭritmio kaj tajĝiĉŭano, sciojn pri biero kaj sano, ekzercojn pri kapdolora masaĝo, informojn pri diversaj religioj: Oomoto, Budhismo, Spiritismo, Ŭombulismo, Katolikismo. Ne Di-kredantoj interesiĝis pri Ateismo.
Finnlanda gazetaro abunde informis pri la UK antaŭ la kongreso, kaj dum la semajna aranĝo okazis intervjuoj. Ĉiutage aperadis kongresa kuriero "La Saltejo", per kiu ni povis ekscii pri diversaj programŝanĝoj, manĝmenuo, kaj aliaj aktualaĵoj. Ekzemple: ampleksan informon pri la ĵus pasinta ILEI-kongreso en Serbio, pri ĝiaj rezolucio kaj aktivado rivelis Mireille Grosjean.

Gajaj brazilaninoj dum la UK

La kongresa ĉeftemo estis: "Vivanta naturo, floranta kulturo", kiu estis abunde pritraktata. Pri Finnlando okazis multaj programeroj. Oni parolis pri ekesto de la lando, pri la demokratio, estis prezentitaj Sameaj minoritataj lingvoj, eblis lerni la finnan lingvon eksprese, okazis kelkaj laŭtemaj ekskursoj. Prelegoj temis pri "Finna naturo", pri "Eduksistemo" kaj pri "Politika vivo en Finnlando". Oni parolis pri Esperanto-historio de Lahtio. Nacia vespero okazis en belega teatro. En bankedo oni gustumis finnajn specialaĵojn.Okazis pluraj posttagmezaj artaj progameroj en kiuj prezentiĝis diversaj kantistoj kaj muzikgrupoj. Ni spektis koncertojn de

Manŭel, Martin Wiese kaj de Ĵele.
Vespere plezurigis nin la kantgrupo Sepa kaj Asorti, Kajto kaj JoMo. Impresis la teatraĵo "Vivo de Galileo" prezentata de Saŝa Pilipović, kiu ankaŭ kantis ciganajn kantojn. La Litova grupo Asorti muzikis ankaŭ
dum la balo.
Estis elektita nova estraro. Duncan Charters, el Usono, elektiĝis prezidanto. Vicprezidantoj estas: Jorge Maia el Brazilo kaj Huang Yinbao (Trezoro) el Ĉinio. Ĝenerala sekretario Alex Kadar el Francio. Kongresojn, kulturon, eldonadon, terminologion prizorgos Orlando Raola el Usono. Pri Afriko kaj Aktivula Maturigo okupiĝos Jérémie Sabiyimva el Burundo, pri Azio kaj Oceanio So Jinsu el Koreio kaj la sciencan kaj fakan agadon prizorgos Amri Wandel el Israelo. Akademianoj elektis novan sekretarion - François Lo Jacomo el Francio. Samtempe kongresis blinduloj. En enirhalo ni povis admiri foto-ekspozicion pri Kroatio: La lando de mirinda naturo. Kanadaj samideanoj prezentis la venontan kongreson en Montrealo al kiu jam aliĝis surloke 80 gesamideanoj, kio estas rekorda nombro. La libroservo ofertis multajn librojn kaj aliaj esperantaĵojn. Okazis paroligaj lecionoj kaj konkurso pri publika parolado. Ne mankis aŭtoraj duonhoroj. Ĉiu kongresano ricevis la libron Kalevala - finna nacia epopeo. Ĝi estis donaco de la finnlanda E-asocio. Oni omaĝis la faman islandan verkiston Baldur Ragnarsson. Kunvenis juristoj, fervojistoj, pedagogoj, mondcivitanoj, ĵurnalistoj, medicinistoj, nefumantoj, ekologiistoj, vegetaranoj, sennaciistoj, matematikistoj kaj aliaj homoj el diversaj organizaĵoj. Fondiĝis asocio de Te-amantoj. Futbal-matĉon ĉi-foje gajnis esperantista teamo je 5:2.

Dum la fondiĝo de la Asocio TE-amantoj en UK

Ĉiutage okazis ekskursoj tra la urbo kaj al proksima ĉirkaŭaĵo. Merkredaj tuttagaj ekskursoj ebligis al la kongresanoj viziti la ĉefurbon Helsinko kaj Tampereo, kie okazis la UK antaŭ 24 jaroj. La ĉi-jara internacia vespero estis brila. Ni spektis lumludadon, plurajn dancojn, kantojn, spritaĵojn. Ĉe la fino kantis internacia koruso. La fermon de la kongreso efektivigis la nova prezidanto Charters Dunkan. Oni dankis al la antaŭa estraro, kiu promesis kunlabori plu. Estis legata la rezolucio de la kongreso, surekrane aperis bondeziro de la sveda ministrino pri kulturo. Prezentiĝis la infanoj kaj adoleskantoj de la Kongreseto. Ĉe la fino estis transdonita la flago al la kanadaj kolegoj. Dankoj apartenas al ĉiuj kiuj preparis la ĉi-jaran 104-an Universalan Esperanto-Kongreson.

Esperanto-futbal-teamo gajnis je 5:2 en UK

Liba Gabalda

La 92-a SAT-KONGRESO en Barcelono
4. 8. - 11. 8. 2019

Ĝi okazis en bieno de Salesianaj fratoj en la populara kvartalo *Horta* de Barcelono. Bela ĝardeno kun pluraj romantikaj anguloj, floroj, basenetoj kun testudoj kaj fiŝoj, fontanoj, statuoj kaj palmoj ĉirkaŭas la lokon.Ĝi estas tre aglabla ripozejo, sed tamen dum la kongreso oni multe laboris kaj ŝvitis pro la varmega tutsemajna vetero.
Antaŭ cent dek jaroj okazis en Barcelono la tre sukcesa 5-a Universala Kongreso, kiun ĉeestis doktoro Esperanto, L.L. Zamenhof. Barcelono allogas. Al la ĉi-jara kongreso aliĝis 220 gesamideanoj el la tuta mondo. Post la alveno oni bonvenigis la unuafojajn kongresanojn kaj klarigis al ili kio estas SAT. En la bela okulfrapa kongres-sako ni malkovris ilustritan kongreslibron redaktitan de Javier Alcalde kun detalaj priskriboj de ĉiuj programeroj. Krom tio enestis dulingva libreto "Esperanto: Unu lingvo por ĉiuj" de Eduardo Vivancos kaj la broŝureto pri "Don Kiĥoto kaj Sanĉo Panco" de Marcel Redulez kaj Klodin' Pomirol.

Dimanĉon, dum la interkona vespero, la ĉeestantoj povis lerni plurajn tutmondajn dancojn. Lunde matene Saioa Escobar kaj Vinko Markov bonvenigis la partoprenantojn de la 92-a SAT-kongreso. La reprezentantoj de diversaj asocioj salutis la kongreson. Juliette Ternant transdonis parkerigitan mesaĝon de sia frato Eduardo Vivancos loĝanta en Kanado. Li ne povis ĉeesti la kongreson persone pro alta aĝo. Tamen, alian tagon, surprize okazis rekta telefona kontakto kun li. Mi invitis la ĉeestantojn al la 72-a kongreso de fervojistoj, okazonta venontjare en Germanio en la urbo Frankfurt ĉe Odro kaj en la pola urbo Słubice. Poste ni komune fotiĝis.
Dum la kongresa semajno okazis E-kursoj por komencantoj kaj por progresantoj, portret-ateliero, spektado de filmoj kaj de nepalaj dancoj, kaj interesatoj povis tabloludi. Bone estis prizorgataj la libroservo kaj la diskoservo. La gajnintoj de fotokonkurso ricevis libron. Aŭkcion prizorgis laŭtradicie Tahira Masako kun helpo de la korea kamarado Sonĝo. Por la asocio estis kolektita sumo de 701,50 €. Przemysław Wierzbowski el Pollando invitis la gekongresanojn per alloga prezento al la venontjara SAT-kongreso, kiu okazos en Bjalistoko, la naskiĝurbo de nia Majstro L.L. Zamenhof. Franjo Martin iniciatis kant-atelieron kun gitar-akompano de Xavier Rodon. La partoprenantoj ĉe la fino prezentis aron da revoluciaj kantoj. Miguel Fernández prezentis sian tradukon "Ha, Karmela" kaj sian poemaron "Revene". Franciska Toubale emociplene deklamis la poemon "Ankaŭ mi estas homo". Okazis peĉakuĉaj sesioj - bildoprezentoj pri diversaj temoj kun komentoj. Ekz: pri rifuĝintoj en Samoso kaj en Francio, historio pri la kongresejo, pri naturkuracado, pri mondmapoj, bitarkivo, pri Klara Zamenhof ktp.
Kunvenis liberecana, sennaciisma kaj komunisma frakcioj, okazis laborkunsidoj kaj diversaj prelegoj: "Altsasu kaj la kataluna procezo", "Ĉu Esperanto plibonigis/plibonigos la mondon?", "Niaj sentoj pri eblo de disfaligo de nia vivmaniero", "Kiel kopirajto malhelpas kulturkreadon", "La retiriĝo-koncentrejoj-Liberigo-Ekzilo", "Ĉu la ĉifrovalutoj

povus helpi la sennaciulan ekonomion?", "Sovaĝaj floroj. Kiam naturo helpas praktiki Esperanton kaj reciproke". "Minoritatoj en infanlibroj", "Pri la japana laborista sindikato Kannama", pri "Hispana revolucio kontraŭ Sovetio". Okazis jarkunveno de la vegetara sekcio kaj de la ekologiisma frakcio de SAT, de la eldona fako kooperativa kaj de la poresperanta fako, de la liberpensula frakcio. Okazis ankaŭ la jara kunveno de la LEA-komitato kaj la asembleo de SATeH.

Partoprenantoj de la 92-a SAT-kongreso

Grandan intereson vekis la programero pri "Norda Koreio: demandoj kaj respondoj" gvidata de la kataluno Alejandro Cao de Benós, kiu havas rektan rilaton kun la registaro de tiu lando. Aldoniĝis alia debato kun samideanoj el suda Koreio, kamaradoj Paz kaj Sonĝo. Ankaŭ vaste estis priparolata la nuntempa politika situacio en Katalunio. Dum socia forumo pri anarkiismo, socialismo, komunismo oni prezentis diversajn politikajn vidpunktojn. Ĉe la lasta laborkunsido estis akceptitaj gvidrezolucio kaj deklaracio.

Duontaga ekskurso al Can Masdeu montris al la partoprenantoj alternativan vivmanieron de malgranda komunumo de 30 personoj en memmastrumata socia centro. La ĉeestantoj povis elekti inter du tuttagaj ekskursoj. La unua malkovris al ili la ĉirkaŭaĵon de *Subirats*, kie troviĝas muzeo de Esperanto fondita en la jaro 1968-a fare de Luis Hernández Yzal. En la dua ekskurso, kies celo estis *Montserrat,* oni vizitis ankaŭ la bibliotekon Ramon Molera. En ambaŭ ekskursoj ili bone tagmanĝis kaj trinkis bongustajn regionajn vinojn.

Prezento pri la venontjara SAT-kongreso

Ĉiuvespere okazis artaj kaj kulturaj spektakloj. Eksterordinara estis la koncerto "Mia liriko kaj muziko" de Miguel Fernández. Entuziasmon atingis koncerto de JoMo, kiu post kelkaj revoluciaj kanzonoj dancigis la publikon tiel fervore, ke ĉe la lasta kanto rompiĝis al lia gitaro du kordoj. Saŝa Pilipovič krom la teatraĵo "Vivo de Galileo" prezentis Universalan Kabaredon kaj kantis ciganajn kantojn. Eŭskajn kantojn kun gitar-akompano prezentis juna knabo Porrumentzio. La lastan vesperon koncertis por ni la fama kataluna grupo Kaj Tiel Plu en unu ĝardena angulo. La intereson de la publiko vekis pupteatraĵo "La sorĉistino kaj s-ro Kristoforo" prezentata de profesia kompanio *Títeres Desde Abajo* (Desubaj pupoj)**.** Pro tiu teatraĵo ili estis antaŭ tri jaroj enkarcerigitaj. Ĉe la fino de la kongreso estis transdonita la Esperanto-flago al la pola reprezentanto. Korajn dankojn al la organizintoj pro la sukcesa kongreso. Pli detale pri la ĉi-jara SAT-kongreso vi povos legi aliloke kaj eblos spekti filmojn pri diversaj kongreseroj en la jutuba kanalo de SATeH: http://www.youtube.com/user/sateh.

Liba Gabalda

ELEKTRIZADO DE FERVOJA LINIETAPO

Mezőzombor – Sátoraljaújhely

Rezulte de longdaŭra laboro pretiĝis la rekonstruado kaj elektizado de fervoja linietapo inter stacioj *Mezőzombor* kaj *Sátoraljaújhely.* Ekde komenco de julio la pasaĝeroj povas vojaĝi per trajnoj tirataj de elektraj lokomotivoj. Efektive la rekonstruado de la linietapo inter stacio *Mezőzombor* kaj landlimo ĉe *Sátoraljaújhely*, portanta en la horarlibro numeron 80c, daŭris preskaŭ dum unu jardeko.
La trakrekonstruo komenciĝis inter stacioj *Mezőzombor* kaj *Bodrogkeresztúr* en 2012, temis pri sep kilometrojn longa trako. Sekvis ĝin inter septembro kaj decembro en 2014 apenaŭ ses kilomerojn longa etapo inter *Bodrogkeresztúr* kaj *Erdőbénye,* poste denove ses kilometroj inter *Erdőbénye* kaj *Olaszliszka-Tolcsva* en jaro 2015, inter aprilo kaj julio. La sekva rekonstruita etapo estis inter stacioj *Olaszliszka-Tolcsva* kaj *Sárospatak* kies longo estis pli ol dekdu kilometroj la laborojn oni faris inter julio kaj decembro en 2016. La rekonstruaj laboroj okazis tute en laŭplana trafikpaŭzo, per trafiko de aŭtobusoj anstataŭantaj la trajnojn.
La nova surkonstruaĵo estas senbreĉe kunveldita, kaj konsistas el reloj UIC 54 tipaj, kaj ŝpaloj el armita betono. La reloj estis renovigitaj, devenantaj el malkonstruitaj ĉefliniaj



Mapo de la linietapo (Fonto: NIF)

etapoj. La maksimuma rapido de la nova trako anstataŭ la pli frua 80 km/h iĝis 100 km/h. Post la rekonstruado malaperis la rapideclimigoj.
Ankaŭ la haltejoj estis renovigitaj en *Szegi, Erdőbénye* kaj *Bodrogolaszi.* Ili ricevis modernajn novajn pasaĝerkajojn, kun aŭdebla kaj videbla pasaĝerinformadoj. La paŝnivelo de la kajoj estas je 55 cm-oj super la relsupronivelo.

La staciojn kaj la lastan interstacian etapon inter *Sárospatak* kaj *Sátoraljaújhely* oni povis rekonstrui samtempe kun la elektrizadaj laboroj. Ĉi lasta estis plej krita parto de la linio. La inundoj de rivero *Bodrog* ĉi tie ofte endanĝerigis la fervojan trafikon. Dum la rekonstruaj laboroj oni devis altigi la fervojtaluson je 1 metro en kvar kilometrojn longo.

Rezulte de la rekonstruado transformiĝis la traka reto de la stacioj. La sternitaj trakforkoj estis produktitaj el relo UIC 54 tipa kun trakforkaj ŝpaloj el armita betono kaj kun elektra nadlorelhejtado.
La planojn por la konstrupermeso de la elektrizado MÁV pretigis inter 2007 kaj 2009, tamen pro diversaj kaŭzoj – ĉefe pro manko de la mono – la konstruadon oni daŭre prokrastis.
Fine, pri la elektrizado kaj la restitaj rekonstruaj laboroj oni anoncis publikan konkurson en 2016, kiun gajnis la Konsorcio M-S en julio 2017. La konsorcio konsistis el du kompanioj kun limigitaj rajtoj, unu el ili okupiĝis pri planado kaj konstruo de fervojoj kaj industritrakoj, la alia pri elektrizado de fervojo.
La neta kosto de la investo estis 21,351 miliardo HUF (ĉirkaŭ 64,7 miliono €), el kiu ĉirkaŭ 1,2 miliardo HUF (ĉirkaŭ 3,6 miliono €) devenis el fontoj de EU.
La specialaĵo de la konstruado estas, ke la kurentprovizado de la elektrizita etapo povas okazi nur el unu dirketo, el elektrosubstacio de *Szerencs*, ĉar ĉe alia fino de la linio, el direkto de Slovakio la elektrizado de la koresponda etapo ne okazis. Temas malpli ol unu kilometro sur teritorio de Slovakio. Pro la unudirekta provizado krom la linia elektra fidro estis konstruita ankaŭ fortiga kaj kurentrekonduka lineo. La solvo estas unika en nia lando. La kurentosistemo estas alternkurento kun 25 kV kaj 50 Hz.
Pro la nova elektrizita linietapo estis bezonata pliigi kaj modernigi la elektrosubstacion de *Szerencs.*
La laboroj de la elektrizado finiĝis printempe en 2019. La kontaktlinean reton oni ekkonektis al tensio la 21-an de majo, kaj jam tiun tagon komenciĝis la kontrolaj testoj. Post la bezonataj reguligoj, la 2-an de julio, la elektraj lokomotivoj transprenis rolon de la dizeloj.
La loĝantoj de regiono Zemplén la 2-an de julio vekiĝis pri historia tago. Sekve preskaŭ tridekjaran atenda-don, aperis la elektraj lokomotivoj en ilia teritorio. Ankaŭ MÁV faris noblan geston por loĝantoj, vivantaj sur iama teritorio de dinastio *Rákóczi:* al la fresan elektrizitan lini-etapon sendis labori la memorlokomotivon pri *Rá-kóczi* kies serionumero estas 480 007, tipo Traxx. La memorlokomotivo labo-ris provizore unu tagon sur la linietapo, kaj ĝi tiris la unuan trajnon sur la novelektrizita etapo, kiu ekiris el *Szerencs* al *Sátoraljaújhely* frumatene je la 4-a kaj14 minutoj.

Memorlokomotivo pri Rákóczi ekiras el stacio Szerencs
(Foto: Károly Szabolcs)

En la stacioj estis transformitaj la telekomunikadaj sistemoj. En *Sátoraljaújhely* estiĝis nova antaŭhejtinstalaĵo por vagonaroj, kaj moderna trafikregada centro, el kiu okazas la trafikreguligo de la tuta linietapo. La teleregataj stacioj ricevis novajn sekurigajn instalaĵojn, tipajn ID 55, kiuj estas relajsaj trakregejoj.

La celo de la fervojkompanio estas plilongigi ĝis *Sátoraljaújhely* la vojaĝdistancon de IC trajnoj trafikantaj nun inter *Budapest* kaj *Miskolc.* Tiel la vojaĝdaŭro, kompare kun situacio antaŭ la elektrizado malpliiĝos 40-50 minutojn inter *Budapest* kaj *Sátoraljaújhely.*

La inaŭgura festo de la elektrizita linietapo okazis la 13-an de julio 2019, okaze de la Fervojista Tago en stacio *Sátoraljaújhely.* László P*alkovics ,* ministro pri novecigaj kaj teknologiaj aferoj, deklaris, ke la hungara kabineto entute ĉirkaŭ en valoro de 1700 miliardo HUF (ĉirkaŭ 5,1 miliardo €) evoluigas la fervojan trafikon. Rezulte de la elektrizado de linietapo *Mezőzombor – Sátoraljaújhely* la longo de la elektrizitaj linioj en nia lando superis 3100 kilometrojn.

Richárd Hörcsik, parlamenta deputito de la regiono rakontis ke la elektrizado en regiono *Zemplén* ekde jardekoj estis en tagordo. Ĉi tiu evoluigo estas investado por la estonto, ja la elektra trakcio estas grave malmultekosta ol la dizela, tiel kostoj de konstruado de la elektra proviza sistemo ĉiam rekompensas sin. Rezulte de la investado ne okazas trakciilŝanĝo, kiu ĝis nun bezonis 10-15 minutojn.

Péter Szamosvölgyi , urbestro de *Sátoraljaújhely* akcentis, ke la Tokaja Vinregiono ricevis tiun eblecon, kiun en aliaj lokoj de la lando oni rigardas evidentaĵo. Ĉi tie nun temas ne sole pri konstruo de kontaktlineo, sed la investado signifas ankaŭ eblecon de la samniveligo por la regiono.

Róbert Homolya , prezidanto kaj ĝenerala direktoro de MÁV aldonis, ili transdonas tiun evoluigon, kiu havas elstaran gravecon ne nur por la vivantoj en nordorienta parto de nia lando, sed ankaŭ por la nacia fervojkompanio. Ĉi tiu evoluigo estas grava, ĉar pere de ĝi oni povas pli altigi la nivelon de la servoj, povas redukti la veturdaŭron kaj povas labori per pli moderna infrastrukturo. Dank' al elektra trakcio grave malpliiĝas emisio de damaĝaj materialoj.

La inaŭgura festo-tranĉo de rubando (Foto: www.kormany.hu)

Sola manko de la evoluigo estas, ke sur la slovaka flanko, inter stacio *Slovenské NovéMesto (Kisújhely/Újhely)* kaj la landlimo, sur apenaŭ unu kilometra etapo mankas la kontaktlineo. Pro tio trairi la landlimon ankaŭ nun eblas nur per dizellokomotivo. Alia problemo, ke kvankam en stacio *Slovenské Nové Mesto* troviĝas kontaktlineo, sed ĝi funkcias per kontinua kurento kun 3 kV.
Verŝajne ĉi tiu problemo estos solvebla per hungara-slovaka kunlaboro.

D-ro József Halász

POSTKONGRESO EN MAROKO

Post la sukcesa 71-a IFEF-kongreso okazis postkongreso en la araba lando Maroko. Mi ankoraŭ ne vizitis tiun landon, pro tio mi scivole atendis la tritagan viziton en la araba lando. Antaŭ la postkongresaj ekskursoj mi studis la historion de la lando, la nuntempan situacion, la urbojn, kaj ĉion pri kio oni devas scii pri tiu lando. En la vojaĝlibro mi legis pri la reĝimo, regnestro, konstitucio, klimato, kulturo, trafiko, geografio, civitanoj de la lando ktp. Laŭ tio mi iomete bone pretiĝis al la vizito.

Maroko estas suverena regno, kiu situas ĉe la nordokcidenta parto de Afriko. Ĝi limas norde la Mediteranean Maron, okcidente la Atlantikan Oceanon, oriente Alĝerion kaj sude Maŭritanion. La nombro de la loĝantaro estas 36 milionoj, el kiuj la berberoj estas 75%, la araboj 15%, kaj pr. 60 mil francoj kaj hispanoj vivas en Maroko. La tersurfaca areo de la lando estas 446,5 mil km^2. La ĉefurbo estas Rabat, kiu enhavas pli ol 600 mil enloĝantojn. La plej grandaj urboj de Maroko estas Casablanca kun 3,5 milionoj da loĝantoj, Fez kaj Tanger.
Mi mencias, ke 99%-j de la loĝantaro estas muzulmano, kaj la nombro de la kristanoj – ĉefe katolikaj – estas nur 1%. La oficiala lingvo estas la araba, sed la berberoj parolas kelkspecajn berberajn dialektojn. Multaj parolas la francan kaj hispanan lingvojn, sed ĉefe la meza klaso de la homoj. Bedaŭrinde en Maroko ne ekzistas landa asocio de Esperanto, kaj ni ne renkontiĝis kun tiuj homoj, kiuj parolus Esperanton.

La historio de Maroko estas ege varia kaj interesa. La prahistoriaj homoj estis la berberoj, kiuj sur ĉi tiu tereno ekloĝis antaŭ plurmil jaroj. La historio de la lando Maroko komenciĝis per konkero de fenicoj antaŭ mil jaroj, kiujn sekvis la antikvaj grekoj, kartaganoj, romianoj, vandaloj, visigotoj kaj bizancanoj. Ĉiuj konkerantoj postlasas ion el siaj kulturoj, aktivecoj, religioj, vivma-nieroj k.a.



Berbera vilaĝo en la montaro Rif

Je la fino de la 7-a jarcento islamanoj invadis Egiption kaj la tutan Nord-Afrikon, inter ili la teritorion de Maroko, kaj tio okazigis ĥaoson. Tiu ĥaoso estigis fundamentisman berberan movadon, kiu konkeris Marokon kaj Andaluzion. Poste nenombreblaj efemeraj klanoj regis en Maroko, sed fine la dinastio Alaŭia direktis la tutan landon ekde la 1630-aj jaroj, kiu daŭras ankaŭ nuntempe. Tiu fakto signifas, ke la hodiaŭa reĝo Mohamedo la 6-a devenas el tiu dinastio.
Je la 15-a jarcento la portugaloj, kaj iom poste la hispanoj konkeris kelkajn zonojn de la nordo de Maroko, tiuj estas Ceuta (1415), Tanger kaj Asilah (1471). La portugaloj konkeris Melijon (1497) por Kastilio.



Loĝejo de riĉa marokano

Je la fino de la 19-a jarcento Francio, Hispanio kaj Germanio planis okupi la tutan landon pro la strategia situo kaj la riĉaj komercaj energiafontoj. Fine Francio venkis, kaj post longaj militoj kaj disputoj en 1912 Francio kaj Hispanio dividis la sultanan marokan regnon en du protektoratoj. Laŭ tio la norda parto estis por Hispanio, kaj la centra kaj suda partoj por Francio. La 2-an de marto 1956 Francio interkonsentis kun la sultano de Maroko pri la sendependeco, kaj poste la 7-an de aprilo ankaŭ la hispanoj abdikis pri la protektado, escepte la urbojn Ceuta kaj Melilla. Per tiuj aranĝoj Maroko iĝis sendependa reĝlando, kaj membro de Unuiĝintaj Nacioj.
Maroko dividiĝas je 12 regioj en kio estas 13 prefektujoj kaj 62 provincoj. La surfaco de Maroko estas varia. Norde troveblas la montaro Rif, en la mezo de la lando estas la longa kaj rokhava montaro Atlaso kun 4167 m-j montopinto. Sude etendiĝas la dezerto Saharo.

La ĉefaj aktivaĵoj de la maroka ekonomio estas agrikulturo kaj turismo. Kelkaj industrioj troveblas en la lando, kiel la aŭtomobila fabriko, teksindustrio, kemiindustrio, nutraĵindustrio, haŭtfabrikado kaj manufaktura industrio. La plej grava industribranĉo estas la fosfatmineja industrio.
Maroko havas naŭ kulturajn mondheredaĵojn de Unesko, kiel ekz. la malnovaj urbopartoj de Tetuán, Fez, Marrákes, Meknes, Esz-Szavira, Mazagan kaj Rabat.
La trafiko en la tuta lando estas iomete akcidentdanĝera. En la lando la longo de vojreto estas pli ol 58 mil km-j, el tio 1800 km-j estas aŭtoŝoseo. La longo de la fervojreto estas 1900 km-j, el kio 1000 km-j estas elektrizita fervojlinio. La fervojlinioj estis konstruitaj ĉefe apud la Atlantika Oceano. Estas interese, ke en la pasinta novembro la maroka Reĝo Mohamedo la 6-a kaj la franca prezidento Emmanuel Macron solene inaŭguris la unuan grandrapidan fervojlinion en Afriko. La 186 km-j longa linio estas projektata por veturoj inter Tanger kaj Kénitra per rapideco de 320 km/h. Per tiu rapideco la trajno trafikas inter Tanger kaj Casablanca dum 2 horoj kaj 10 minutoj pli ol duone sur antaŭaj linioj (4 horoj kaj 45 minutoj). Gravaj havenoj estas en urboj Casablanca, Tanger kaj Agadir. La aertrafiko estas iomete evoluinta, ĉar dekdu



Kaproj sur la arbo arganio

urboj havas internacian flughavenon, kio estas unika inter la arabaj landoj.

La homoj diras en Maroko la rangliston de la marokaj urboj: la centro de la komerca vivo kaj la industrioj estas Casablanca, en Rabat rezidas la registaro, en Tanger estas la plej grava havenurbo kaj la trairejo el Maroko al Hispanio, la urbo Fez estas la centro de la kulturo kaj religio, Marrákes estas la turisma centro ktp.

Grandrapida trajno en la stacidomo Tanger

La manĝado en Maroko okazas laŭ speciala ceremonio, ĉar oni diras, ke la manĝado signifas la puriĝon de la korpo. Do antaŭ la manĝado oni devas lavi la manojn, kaj la manĝaĵojn oni surtabligas en granda komuna plado, el kio la gastoj rajtas priservi sin per dekstra mano (ĉar laŭ la marokanoj la maldekstra mano estas ĉiam malpura). La plej karakterizaj manĝaĵoj estas la „kebabo” kaj la „kuskuso”, la kokidaĵoj, ŝafidaĵoj kaj la fiŝaĵoj.
Dum nia restado en Maroko mi konstatis, ke la marokanoj estas gastamaj homoj. Ili estas amikemaj kaj helpopretaj ĉefe al la eksterlandanoj.

Kvardek partoprenantoj de la Postkongreso vendrede frumatene startis el la kongresa hotelo de Malago, kaj per speciala aŭtobuso dum unu horo ni atingis la havenon. Per ŝipo ni veturis dum unu horo al la urbo Ceuta. De tie ni denove vojaĝis per aŭtobuso, kaj ĉe la „kontrola punkto” inter Hispanio kaj Maroko sekvis longa kontrola proceduro. Post la proceduro jam estis preskaŭ vespere, kaj ni busiĝis al la konforta kaj moderna hotelo „La Paloma” de urbo **Tetuán.** En tiu hotelo ni loĝis dum du noktoj, kaj de ĉi tie ni ekvojaĝis al pluaj urboj kaj lokoj en norda Maroko. Antaŭ la vesper-manĝo ni promenadis en urbo, kiu estis ĉefurbo de la hispana protektorato inter 1913 kaj 1956. Ĝi estas la somera rezidejo de la Reĝo Mohamedo la 6-a. La nombro de la loĝantaro en ĉi tiu urbo estas pli ol 460 mil homoj. La urbo estas historie rilata al Hispanio. Multaj andalusanoj estis forpelitaj el la Granada Regno en la fino de la 1490-aj jaroj, kaj ili rifuĝis al Tetuán. En 1860 okazis milito inter Hispanio kaj la maroka sultano Mohamedo la 4-a, kaj la urbo estis konkerita de la hispana armeo, kvankam nur du jaroj poste ĝi estis redonita al la marokanoj. La plej vizitendaj vidaĵoj estas la Reĝa Palaco, kelkaj belaj placoj, interesaj muzeoj kaj diversaj hispandevenaj konstruaĵoj. Ni promenadis ĉirkaŭ la Reĝa Palaco, en la malnova urboparto kun ĝiaj mallarĝaj stratetoj, kaj ni vizitis kelkajn malgrandajn vendejojn.

En la dezerto

En la sekva tago ni vizitis urbon **Asilah,** kiu kuŝas sur la bordo de Atlantika Oceano. Ĝia historio estas riĉa, ĉar tie restadis fenicoj, kartaganoj, romianoj, araboj, portugaloj kaj hispanoj. Asilah estis grava centro de kultura kaj komerca aktivaĵoj, precipe rilate al la sudhispanaj islamaj regnoj. La urbo nuntempe havas 31 mil loĝantojn. Urbon Asilah vizitas multaj turistoj pro ĝia ĉarmo kaj turismaj allogaĵoj. Ni promenadis sur la puraj kaj blankaj stratoj, rigardis la interesajn konstruaĵojn, vizitis la malnovan urboparton kaj la belajn plaĝojn.

Spicvendisto en urbo Tetuán

La sekva vojaĝcelo estis la granda urbo **Tanger.** Ĝi estas la ĉefurbo de la norda regiono de Maroko, kiu trapasis la saman sinsekvon de invadoj kaj koloniadoj. En 1786 ĝi iĝis diplomata urbo de la Reĝlando Maroko. Tial multaj eksterlandaj diplomatoj lokiĝis en Tanger. En 1925 kelkaj eŭropaj landoj kaj Usono deklaris la urbon kiel sian kunposedaĵon de ili. En 1940 la hispana armeo venkis la urbon, kaj forpelis ĉiujn diplomatojn. En 1945 Tanger revenis al sia antaŭa politika statuso, kaj en 1956 ĝi aliĝis al la ĵus sendependa nova Reĝlando Maroko. La plej konataj vidindaĵoj de la urbo estas la Granda Moskeo, la urbocentra bazaro kaj la Placo de la 9-a de Aprilo. Tanger nuntempe estas moderna urbo kun grava haveno, kaj ĝi havas malnovan urboparton kun multaj diversaj varoj.

En la lasta tago de la restado en Maroko ni vizitis urbon **Chaouen**, kiu troveblas en montaro ĉe la limo de nacia parko „Talassemtane". Ĝi havas 43 mil loĝantojn. Ĝi estis fondita en 1471 de berberoj. Chaouen estas tipa urbo per blua koloro sur la domoj, kies tradicio devenas el mezepoko. Ni vizitis la antikvan kaj grandan moskeon, la antikvan karavanejon, tapiŝo-vendejon ktp.

"Blua strato" en urbo Chaouen

La lasta urbo, kiun ni vizitis, estis **Ceuta**. Ĝi estas aŭtonoma urbo ene de la regiona distribuado de Hispanio. La nombro de ĝia loĝantaro estas 85 mil. La loĝantoj ĝuas gravajn fiskajn avantaĝojn cele kompensi la geografie apartan afrikan situon de la urbo. La ĉefaj vidindaĵoj de Ceuta estas la Reĝaj Muregoj, la Placo de la Konstitucio, Placo de Afriko, diversaj preĝejoj kaj gravaj modernismaj konstruaĵoj.

Mi povas konstati, ke la Postkongresaj ekskursoj en Norda Maroko estis miksaĵo de tipa araba etoso kaj hispanaj influoj. En ĉiuj pejzaĝoj kaj urboj ni povis admiri la naturajn belaĵojn, la purajn kaj svarmajn stratetojn kaj bazarojn, la bongustajn manĝaĵojn kun araba muziko en tipaj arabaj restoracioj ktp. Do la ekskursoj en Maroko kontentigis mian imagon kaj atendadon per tiu vizito.

Márta Pintér

Belega panoramo de Budapeŝto el la tramo nro 2

Transponta Esperanto-Kongreso
germana - pola - fervojista



TRAKO

Frankfurt (O) / Słubice
29-a de Majo – 5-a de Junio 2020

La 72-a kongreso de IFEF okazos de la 29-a de majo ĝis la 5-a de junio 2020 en la germana urbo Frankfurt (O) kaj en la pola urbo Slubice
Informojn oni povas ricevi de la Hungara Fervojista Esperanto-Asocio